

# esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ★ 2/1999  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ★ Aprilo 1999

## In Memoriam Cathy Schulze

David Wolff	2
Duncan Charters	3
E. James Liberman	4
Dori Vallon Wheeler	6
Aliaj	6
<hr/>	
Raportoj pri:	
SFSU 1999	7
Schulze Fund	8
USEJ	8
Ia Jara Kongreso	9
Koresponddeziroj	9
Recenzoj <i>Vojagū!</i>	10
Leteroj	11
Esperanto in the media	11
Menciinde	11



## A Wake in Print

In this issue, you will find several thoughts about the recent death of our beloved Cathy Schulze, who for decades was the very heart of the Esperanto movement in the United States. All of us who had the privilege to know her will certainly cherish their favorite memories of Cathy; here in this issue we present a kind of printed wake, wherein we can read a few stories about our recently departed friend in order to keep her memory vibrant and to give expression to our sorrow. I hope that some of what follows in this issue will also inspire you to recall some fond moments with Cathy which you can remember with a smile and good cheer. I am sure that Cathy would not approve of our lengthy wallowing in sorrow at her passing: so let's honor her memory by sharing some stories about her, then lifting a glass to toast her good influence on our lives; and then let's get back to work furthering by whatever means are available her beloved project of international communication. I'm sure she would want it that way.

Cathy was the first teacher for the majority of two generations of American Esperantists, mostly by means of the ten-lesson free postal course. I, too, learned much of my basic Esperanto from Cathy's corrections of my ten free lessons. I didn't make many mistakes (I was a good student!) but she was always eagle-eyed about finding errors and gentle about correcting them. Then Cathy encouraged my attending the summer intensive Esperanto course at San Francisco State and even arranged that I receive a scholarship there! I have met many active Esperantists with just such a beginning, and not only from the USA – Cathy arranged many scholarships for students from abroad.

She recognized that a truly international student body at SFSU can greatly contribute to the richness of the experience. She always beamed in profound joy during the first day of the summer session, seeing a group of fifty or more enthusiastic students of our dear language. And the garden party at her house every year was a high point of the summer, when much of the local Esperanto community would assemble to meet the newcomers and the returning students, all sharing the entertainment and good cheer.

Cathy loved a good joke and a funny story. I don't recall her telling jokes very often, but she laughed easily and often. Her infectious laughter seemed to encourage further gaiety. Perhaps this was the secret of her successful long marriage: her husband Bill liked to tell stories and Cathy enjoyed hearing them. During conventions Cathy seemed to be always surrounded by friends chatting merrily.

Those of us who were close to Cathy saw her weaken in her last years; but we will all remember her for the focused energy and tireless efforts which she quietly and competently donated to her beloved project, this movement for linguistic democracy.

Cathy was an inspiration for me and surely for many others. Her constant devotion to Esperanto through a half-century serves as a model of dedication. Her two main projects, the ten-lesson free postal course and the San Francisco State University summer intensive classes, are still the mainstays of the Esperanto movement in the United States, and have great impact in many other countries. I hope we can all continue to support these two crucial manifestations of Cathy Schulze's vision of a world rich in international communication.

Miko SLOPER

**Esperanto League for North America**  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530,  
USA/USONO  
tel: 510/653-0998; fax: 510/653-1468;  
e-mail: elna@esperanto-usa.org

**President/Prezidanto:** David T Wolff  
**Vice President/Vicprezidanto:** Derek S Roff  
**Secretary/Sekretario:** Ellen M Eddy  
**Treasurer/Kasisto:** Anna Bennett  
**Other Board Members/Aliaj estraranoj:**  
Steven G Belant, Mike Donohoo, Grant T Goodall, D Gary Grady, Michele Gregory, Dorothy B Holland, Reginald Jaderstrom, Orlando E Raola, Sylvan J Zaft

**Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo:** Miko Sloper  
**Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo:** Ionel Onet

#### esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Vol. 35, No. 2  
ISSN 1056-0297  
**Editor/Redaktoro:** Ionel Onet  
tel. 510/653-0996; fax: 510/653-1468;  
e-mail: ionel@esperanto-usa.org

Materials for esperanto USA should be sent to/Materialojn por esperanto USA oni sendu al: esperanto USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA/USONO, or by e-mail/aŭ e-poôte al: e-usa@esperanto-usa.org.

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or the editor of this bulletin/La opinioj esprimitaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ de la redaktoro de ĉi bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permisata reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republikigita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 28.05.1999.

## Saluton ĉiuj,

Whether or not you knew Cathy Schulze, you have lost a friend.

Cathy passed away on February 14. For decades, she and her husband Bill were among the most important Esperantists in this country. Cathy became an Esperantist in 1940, and organized the book service out of her home for ten years. She was our newsletter editor for another ten years, Vice President of ELNA once, a UEA delegate, and a pillar of SFERO, the San Francisco Esperanto Regional Organization. She was a Life Member of both ELNA and UEA. Both Cathy and Bill were named Honorary Members of ELNA, and Cathy was also named an Honorary Member of UEA. In brief, they were among the hardest-working, most effective, and longest-running people in our Movement. As you saw in the previous issue of *Esperanto USA*, the ELNA Board just passed a resolution thanking Cathy for her monumental work with the SFSU courses and the free correspondence course.

But this long list of achievements does not even touch another important legacy of Cathy's. Almost every activist in ELNA, and many other Esperantists, knew her and deeply appreciated both her work and her warm and welcoming personality.

I didn't personally know Cathy very well. I attended SFSU in 1983 (three of the most important weeks in my Esperanto life) and ran into her occasionally, but of course we were both busy. We met briefly during the annual conventions; we occasionally corresponded about Esperanto matters. Even so, I knew Cathy as a warm-hearted and caring person, who always had time for her friends – and everyone was her friend. Everyone who spoke of her spoke with respect and love.

We'll take some time at the national convention to share our memories of Cathy. If you want to send a memorial donation to ELNA, Cathy requested that these go to the SFSU Scholarship Fund, which supports students who otherwise could not afford to attend the SFSU course.

Adiaŭ, Cathy.

David WOLFF, President  
dwolff@world.std.com  
978/264-0286 (8-10pm Eastern  
time weekdays, noon-5pm week-  
ends)



La portontoj de la torĉo de Cathy; iliajn nomojn vi trovas sur p. 8

# CATHERINE LOUISE SCHULZE

4-A DE NOVEMBRO, 1913 – 14-A DE FEBRUARO, 1999

Kiu estis Cathy Schulze kaj kion ŝi faris por la Esperanto-movado en Usono?

Sen troigo oni povas aserti ke neniu alia individuo havis pli gravan rolon en la progresigo de Esperanto en Usono dum la lastaj jardekoj.

Cathy ekernis Esperanton en 1939-1940 Cseh-metode de Doris Tappan (poste edzino de George Connor, kiu direktis la agadon de EANA, la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko). Cathy admiris la talenton de sia instruisto sed ideologie kaj spirite rifuzis akcepti la politikan makartismon, kiu karakterizis tiun asencion. Pro siaj profundaj homsenetoj, ŝi intuiciis ke Esperanto povos progresi nur se ĝiaj adeptoj vivos la principojn de la homamo, kiu por D-ro Zamenhof estis fundamentaj por la sukceso de la lingvo kaj la atingo de ĝiaj homaranismaj celoj. Cathy do aliĝis tutkore al la grupo kiu fondis la nunan ELNA por dece reprezenti Esperanton kaj ĝiajn idealojn al la usona publiko.

Mem talenta instruisto de la lingvo, ŝi vaste informis pri la eduka valoro de Esperanto kaj persvadis plurajn elementlernejajn instruistojn kaj lernejestrojn enkonduki Esperanton en lernejojn de la San-Franciska regiono.

La kvalitoj kiuj faris ŝiajn prezentadojn tiel allogaj kaj persvadaj estis la tute aŭtentikaj amo kaj zorgemo, kiujn ŝi direktis al ĉiuj kunlaborantoj. Oni sentis la sincerecon kaj altan estimon, kiun ŝi havis por ĉiuj kiuj laboris por progresigi la homaron, kaj ŝian profundan intereson helpi al ili atingi siajn idealojn.

Post la etapo de disvastigo de Esperanto en la lernejoj, ŝi fondis la Es-

peranto-Informcentron en sia hejmo en Hillsborough, kie ŝi logis ĝis la vivofino. Ankaŭ la sprite grumblema Bill ne povis rezisti la forton de la edzina idealo, kiu ĉiam persistis malgraŭ la fojaj aŭ oftaj kapricoj de la esperantistoj mem. Li frue emeritiĝis de bone salajrita administra posteno ĉe la fervojo "Southern Pacific" por aldoni siajn fortojn al tiuj de la edzino per tuta sindediĉo al la laboro. Dum li prizorgis la libroservon de la centro, ŝi daŭrigis la laboron eĉ post la malapero de la Novjorka informcentro kaj la preskaŭ tuta centriĝo de la nacia informado en ilia hejmo.



Cathy havis la talenton profiti bonajn ideojn kaj ilin perfekte adapti al novaj cirkonstancoj. En 1969, Allan Boschen sukcesis aranĝi someran Esperanto-kursaron en North Adams State College en Massachusetts.

Konstatinte ke tiun aranĝon subtenis pli ol dudek esperantistoj el la tuta lando, ŝi tuj reiris al la plej konata universitato apud la hejmo, San Francisco State, kaj post nelonge sukcesis persvadi kaj la dekanon pri

humanismaj studioj kaj la direktorono de someraj programoj serioze konsideri la aldonon de Esperanto-programo en 1970. Tiel komenciĝis la fama kursaro, kiu restis konstanta ĝis hodiaŭ. Unue, la kursaro dependis sufice multe de lokaj esperantistoj, tamen kiam evidentiĝis ke tiu subteno ne rezultigus sufice konstantan alfluon de kursanoj, ŝi konvinkiĝis pri ideo de la angla instruisto Leslie Hartridge allogi novajn esperantistojn provizante interesitojn per senpaga perpoŝta dekleciona kurso.

Dum la jaroj ŝi daŭre disvastigis la usonan adaptacon de tiu koresponda kurso, prizorgis la plimulton el la lernantoj, sendis kuraĝigajn notojn kiuj montris sian sinceren intereson pri ĉiu individua lernanto, kaj per tio varbadis por la kursaro en San-Francisko. Nenio pli ĝojigis ŝin ol konatiĝo kun la lernantoj, kiuj unuafoje venis al la kursoj, kaj poste revenis kaj revenis kaj fariĝis aktivaj laborantoj por nia lingvo. Ŝi aparte interesigis pri gejunuloj kiuj certigus la estontecon de la Movado, kaj malavare donacadis por subteni ilian ĉeston.

Iom post iom ŝi povis cedi taskojn al aliaj, aparte la Esperanto-Informcentron kiu transformiĝis laŭfunkcie en la Centran Oficejon de ELNA, tamen ŝi ne povis lasi la patrinan zorgemon de la lernantoj, kiujn ĝisfine ŝi amis, flegis kaj prifieris.

Por mi persone la konatiĝo kun Cathy estis unika privilegio. Mi sentis tion kiam oni unuafoje prezentis ŝin al mi en la Pittsburgha Kongreso de ELNA en la sesdekaj jaroj. La junulo kiu min prezentis (fajrulo de la tiama JEN – Junularo Esperantista de Nordameriko) esprimis evidentan ad-

miron pri tio kio estis Cathy kaj kion ŝi jam atingis por la Movado. Tuj ŝi ekinteresiĝis pri mi kaj volis helpi atingi la celojn de nova emmigranto al Usono, kiu venis por fari postdiplomajn studojn pri lingvoj kaj daŭrigi la laboron por Esperanto. Kiam ŝi invititis min (post la instruado en North Adams) helpi William Auld fondi la kursaron en San-Francisko en 1970, kiu povis rezisti? Pat kaj mi ĵus geedziĝis, kaj mi ricevis inviton instrui la hispanan lingvon en speciala programo en Meksiko tiusomere. Sed kiu povis rezisti inviton de Cathy, eĉ se apenaŭ kuniris salajro? Ŝi malfermis sian hejmon al ni kaj gastigis nin en sia gastĉambro dum la tuta kursaro. Ŝi zorge preparis belajn manĝojn kaj donis al ni malavare ĉion, kio necesis. Kio ajn estis la bezono, ŝi kaj Bill rapide kontentigis ĝin.

Mi eĉ devis fari iom komplikan aranĝon pri kondukpermesilo, kaj ĉion ili tiel afable kaj senĝene prizorgis kvazaŭ estis la plej granda plezuro en la mondo solvi ĉies problemojn.

En postaj jaroj, ŝi zorgis malpliigi la ĝenojn kaj elspezojn kiam estis malfacile fari aranĝojn por reiri al la programo en San-Francisko kun propra familio, kaj rezulte niaj du esperantistaj filinoj povis multe profiti la sperton de formala lernado de la lingvo ĉe SFSU.

Tiu amo, tiu estimo, tiu kuraĝigado, helpis al ĉiuj pli bone prepariĝi por helpi pri la progresigo de la movado. Ŝi ne toleris malbonan konduton de esperantistoj kaj serĉis en ĉiuj la karakteron kaj kvalitojn, kiuj plej bone servus la movadon.

La granda hungara poeto Julio Baghy ricevis siatempe la kareskribon "Homa homo". Same meritas tiun priskribon Cathy Schulze.

Inspira, dediĉita, ŝi sciis valorigi la homojn kaj ilian laboron por siaj idealoj. Si tiel fortigis ĉiujn el ni kiuj

venis en kontakton kun ŝia larĝanima espero ke la idealo de Esperanto venkos la antaujuĝojn de la mondo, individuon post individuo. Modelo kiu konvinkis nin ke se tiel amema kaj konvinkita homo tiel alte taksas la laboron por Esperanto, ĉio kion ni faras por ĝi valoros por honori tiun modelon kaj per tio plibonigi la mondon. Ŝia oferemo ebligis nian oferemon, kaj la spiritan plifortigon, kiu malfermis por ni novan horizon-ton en la servado al la homaro. Kio ebligis la transformon de la usona Esperanto-movado kaj de la usonaj esperantistoj el eta primokita flank-grupo en unu el la plej potencaj kaj respektataj kontribuadantoj al la antaŭenigo de la tutmonda movado.

Duncan CHARTERS (Elsah IL)

Materialo represita, laŭpermese, el *Arko!*, februaro 1999.

†La redaktoro de tiu ĉi bulteno ne kapablas trovi la ĝustajn vortojn por esprimi siajn sentojn post la malapero de nia kara Cathy. Li, do, preferas uzi la vortojn de Marie Hankel, prenitajn el *Esperanta Antologio*. Dua el-dono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984, p. 32-33:

Viu is for el nia tero,  
Etere nun silentos vi,  
La belajn vortojn de la vero  
De nun neniam aŭdos ni.

Mi ofte sentis la deziron  
Saluti vin el mia kov,  
Esprimi skribi la admiron –  
Ne eble nun, vi iu is for.

A nimo justa, nobla koro,  
Vi dormas, kaj ne aŭdas min,  
Koneculo nur en la doloro:  
La verkoj viaj benis nin.

## Remembering Catherine Schulze

It wasn't long after Catherine Schulze died that I realized that there are too few mothers in the Esperanto movement. Cathy herself worried about how few young women there were among the students she had taught over the years. On reflection I'd say that there are too few recruiters and teachers like Cathy: a model of intelligent, gentle perseverance, indefatigable, supportive, upbeat, modest. In a word, attractive, *alloga*. Together with her late husband, Bill, who died in 1993, Cathy did more than anyone to keep Esperanto *vigla* in the United States – no mean feat in a place where most people are content to let English solve the world's language problems.

Cathy died at 85, seven years after my mother's passing at the same age. The two had several enjoyable meetings. My mother had learned several languages beside her native English and Yiddish – the Jewish lingua franca that my parents generally reserved for private communication in front of the children. They had mixed feelings about my enthusiasm for Esperanto after my first trip to Europe in 1954. They thought it would pass: I was only 19. But as an Army brat who attended five different schools before settling in Oakland – in Cathy's orbit – I was ready for a stable link to diverse elements in a changeable world. And soon I met Cathy, alma mater to so many, who helped me get beyond the question, "If Esperanto is so good, why hasn't it been adopted yet?" If the world isn't ready for something, does that mean it's a bad idea?

Some thirty years later I spent a week at the Esperanto summer course at San Francisco State University, Cathy's wonderful project

begun in 1970. One day I brought my mother to the advanced class to see and hear the 50 students and three outstanding teachers from far-flung places. She was impressed, but noticed that after all those years my accent still needed work!

Cathy was cosmopolitan, too, at home in all parts of the world where people spoke her languages, though her education after high school was "only" secretarial. Behind Bill's Germanic name is her maiden name, Gigliotti: Connecticut Italian. She was a teacher most of her life but not, as I had thought, a school teacher who turned to Esperanto. Rather, she studied the language in New York, and qualified as a teacher of the direct (Cseh) method. Cathy was soft spoken – especially compared with her husband, Bill – had no airs, no political ambition, and did not sound cosmopolitan (my mother was not impressed with her accent, either!). She was astute, straightforward, low-key and conciliatory but also strong-willed and tenacious when she cared strongly about something or someone. Cathy thought more about practical learning than about theory, enjoyed literature more than linguistics, people more than politics. Though she never led the U. S. Esperanto movement from the front, she impelled it from the center. She declined most offers to preside but used her influence to persuade others to do that while she plugged away at the details. Her file cabinets are filled with correspondence of 50 years, with the great names in the Esperanto world and her humblest students. She never found the time to sort through it – always being more interested in addressing the present than in looking back, whether that meant recruiting one promising new member of a club or worrying about whether there would be enough stu-

dents next summer for the SFSU course.

It has been written that it takes 200 years for a new scientific or philosophical idea to take hold with the public. What would Cathy say to that? She might just smile and correct another postal lesson, plan another meeting, write another letter. Two centuries ahead is too far away; a busy person has things at hand to address. The play of ideas must go on – not according to some script, but with freedom to improvise and time to practice.

Both idealistic and practical, Cathy had a lot in common with Ludovic Zamenhof: their labors were Herculean, their guidance was Orphic. He and she neither wanted nor feared conventional power; models of tolerance, they were passionate about their work, unfazed by an indifferent majority outside and immune to bluster and selfishness within the Esperanto movement. In the universal babble of babes they found an answer to the Babel of grownups; in the wisdom of poets and the joy of music heard through the din of guns and bombs they stood convinced of the power of love over hate.

I was part of the happy group with Cathy in Iceland, UK 1977: the 20-hour days, the National Theatre production in Esperanto, a visit with the President, the fish and mutton, the ball. And in China, 1986: Tiananmen Square, the Great Wall, being part of a racial minority in a vast empire opening its old gates to speakers of a new language. These wonderful celebrations rewarded the countless hours of work. Thanks to support from Cathy and Bill the Esperantic Studies Foundation also brought observers to that Congress (including James Fallows, who wrote about the Congress in *Atlantic Monthly*). The Schulzes' long-term support for ESF

reflected their commitment to making Esperanto known and respected outside the movement itself. They were convinced of the need to interest diverse professional, academic and political audiences in the issues raised by Esperanto, and to help the Esperanto emoting engage effectively with those audiences.

Cathy's head wasn't turned by honorary memberships in ELNA and UEA, a poetic salute from William Auld, a William and Catherine Schulze scholarship fund. She went on working, always her own secretary, just beginning to appreciate the computer when the fatal illness struck. Generous in spirit and in support of her goals, frugal and cautious in everyday living, having a quiet sense of humor, sensitive but hardly sentimental, she was completely trusted by all who knew her. Thousands of students and friends will remember her thoughtful typewritten letters, and her hand-corrected Esperanto lessons.

Childless in the conventional sense, Cathy was a foster mother to me and many others. During her active years she entertained visitors from all around the world. At the end she chose hospice care and was kept comfortable by a good doctor and caring nurses. She was cheered by cards, letters, and calls and was visited at home by her nephew, Frank Lanzone, and a few close friends. She wanted no funeral or memorial service, but I think she would have been pleased by the obituary in the San Francisco *Chronicle* (February 24) that described her as "one of the nation's most ardent advocates for Esperanto." A humble woman, she makes us humble.

E. James LIEBERMAN  
(Washington DC)

## CATHY Friend and Teacher

Cathy Schulze, an intelligent and wise teacher, combined the simplicity of Andreo Cseh, the love of language of Montagu C. Butler, and the idealism and hope of Dr. L. L. Zamenhof.

fun. From Johano Muso in the little book *Esperanto por infanoj* we learned everyday words. We followed Nik Nek and Kat Jen through romantic adventures written by Julio Baghy in *Konversacia literaturo. La*

permission from the Extension department of the University of California to hold an Esperanto class for credit for teachers in San Mateo. District administrators and some teachers supported the class with the result that Esperanto was taught in several of the schools at that time.

Bill and Cathy Schulze saw the continued need for qualified Esperantists in the U.S. They convinced the leaders of SFSU to present summer Esperanto workshops in 1969. These classes have flourished and are now world famous. Cathy even set up the 30<sup>th</sup> session this year though she didn't live to see it. But she will live forever for in the International Registry of Stars there are now two new stars: Esperanto star Cathy Schulze and Esperanto star William Schulze. These stars will continue to shine in the heavens and reflect hope back to all Esperantists on Earth.

Dori VALLON WHEELER  
(Goldendale WA)



Cathy and Dori with supporters of the Esperanto classes in San Mateo (1964)

Yes, her energetic from-the-heart guidance began for me one Saturday in 1962. Esperantists came many miles to a workshop in San Mateo. Dr. Ed Feldman and Lavina Parsons were teaching Esperanto 5<sup>th</sup>-6<sup>th</sup> graders at Sunnybrae School in San Mateo. The children already speaking Esperanto presented a puppet show, sang songs and recited poems. I learned that "samideanoj" were "pacaj batalantoj". I wanted to begin teaching this language of brotherhood to 4<sup>th</sup> graders at Turnbull School. Principal Phil Vandor was pleased. I needed lessons.

Cathy's adult evening class was

*Espero* and *La Vojo* from Dr. Zamenhof brought us into the culture.

Cathy and I helped my students write poems and draw pictures for the children's publication *Grajnoj en la vento*. She saw the joy of the children as their world view expanded. She invited people from around the world to visit the classroom so that the children could experience how the language truly works. These included: William Auld (Scotland), Yoshimi Umeda (Japan), and Prof. Lee Chong-yeong (S. Korea) who later became president of the World Esperanto Association.

In 1964 Cathy and Bill received

†Kion adekvate oni povus diri por doni komforton pri la forpasado de Cathy Schulze? Nome de UEA kaj aparte kaj akorde al la specifa peto de la estraro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, bonvolu sciigi la membrojn de ELNA kaj ĉiujn amikojn de Cathy, ke ni en multaj landoj for de la ŝia, profunde kaj apreza kaj aplaudas tion, kion ŝi faris dum multaj jaroj por plibonigi nian mondron. (Kep ENDERBY, Prezidanto de UEA)

†Nome de UEA mi esprimas kondolencojn al la usonaj esperantistoj pro la forpasado de nia honora membro Cathy Schulze. Ŝia ekzemplo instigu la novajn generaciojn de usonaj esper-

antistoj al same intensa kaj sukcesa agado. (Renato CORSETTI, Viceprezidento de USA).

†Mi dividis kun vi kaj la tuta usona esperantistaro la angoron pro la forpaso de tiu grava kolono de la tutmonda esperantistaro. La nomo de Cathy Schulze estas konata ne nur de aktivuloj, sed ankaŭ de tiuj ‘simplaj membroj’, kiuj interesigis pri la San-Franciskaj kursoj. (Michela LIPARI, Generala sekretario de UEA)

†La informo pri la forpaso de s-ino Cathy SCHULZE donis al ni senton de granda manko. Si estis ne nur gravega motoro de la usona Esperantomovado dum multaj jardekoj, si estis ankaŭ kara amiko al multaj homoj tra la mondo, inkluzive kelkajn el ni, anoj de EPA. (Kyotaro DEGUCHI, Prezidanto de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto)

†Ni aldonas niajn kondolencojn pro la morto de la meritplena Cathy Schulze. Je ŝia memoro ni plu varbas por la E-kursoj ĉe SFSU, kies patrino ŝi estis. (Andrzej GRZĘBOWSKI, Prezidanto de Monda Turismo)

†Cathy estis, kiel vi ŝiuj scias, absolute unika homo. Mi dubas, ke iu ajn en ajna lando faris tiom, kiom ŝi faris por Esperanto. Si restos en niaj memoroj longe. (William R. HARMON, Ĉefdelegito de UEA)

†La novajo pri la forpaso de Cathy Schulze vere frapis min. Mi admiris ŝin pro la senlimaj amikemo kaj bonkoreco, kiujn ŝi ĉiam elmontris kaj ŝia figuro restas en mia menso kiel unu el tiuj malmultaj homoj, kiujn mi trovis en la E-mondo, kiuj kapablas inspiri kaj pozitive vivigi la E-aktivadon. Vi perdis valoran homon kaj ne nur vi certe funebras nun tion, sed nia tutaj Ameriko. (Atilio OREL-LANA ROJAS, UEA-komisiito por Ameriko)

†Kun granda bedaŭro ni ekskriis pri la forpaso de nia kara Cathy Schulze. Ni, kiuj konis ŝin, taksis ŝin kiel

grandan sindoneman kaj plene amikian batalanton pri la ideo de paco kaj kompreno inter gentoj kaj homoj. Ŝia nomo restos en niaj koroj, kaj en tiaj malĝojaj momentoj ni akompanas vin ĉiujn. (Hugo MORA POLTRONIERI, Viceprezidanto de Kostarika E-Asocio)

†Mi nepre deziras esprimi miajn kondolencojn pro la morto de tiu granda esperantistino: Cathy Schulze. Si eble estis ĉie, kie esperantismo (kaj ĉefe Esperanto) ekfloris. Grandega ekzemplo de sindonemo por ni ĉiuj. Granda perdo por ĉiuj. (Rubén FELDMAN-GONZÁLES, Prezidanto-Fondinto de la meksikia filio de AIS)

†Nome de ĉiuj kanadaj NOREK-anoj, ni sendas niajn kondolencojn kaj nian promeson fari ĉion necesan portonte en la trian jarmilon la verdan torĉon, kies flamon Cathy nutris per sia entuziasmo dum longa tempo. (Wally kaj Olga DU TEMPLE, Kanado)

†Al ĉiuj esperantistoj en Usono sincerajn kondolencojn okaze de la forpaso de la kara Cathy. (Spomenka ŠTIMEC, Kroatio)

†Bonvolu akcepti miajn kondolencojn pro la forpaso de karmemora Cathy Schulze. Sendube la usona kaj la monda E-movadoj perdis unu el siaj plej gravaj figuroj. De la sindedico de Cathy ni tamen ĉerpis insipiron kaj kuraĝon, por ke ni realigu la revon, kiun ŝi vivis. (Paul GUBBINS, Britio)

†Certe, por multe da esperantistoj en la tuta mondo ŝi estos neforgesebla. Ni esperu ke ŝiaj rekta laborado, bonkora kuraĝigado, financa apogado kaj modela E-vivo dum multaj jaroj daŭre kontribuos al la plua progreso de Esperanto en la mondo. (Bill MAXEY, Powhatan VA)

†I was sorry to hear that Cathy Schulze passed away. She was well known for her setting up the annual summer courses at SFSU, and han-

dling much of the 10-lesson correspondence course. However, she was behind the scene in much more, and, like her husband Bill, will live on in all she did as well as in our memories. She was a good friend and an inspiration to all who knew her, and, as such, will always be a blessing both in the USA and worldwide. (Tom GOODMAN, Baltimore MD)

## SFSU Esperanto Workshop '99

It'd been four months since Cathy Schulze asked me to take over the responsibilities of planning and overseeing the annual Esperanto summer workshops at San Francisco State University. Cathy had done much of the groundwork of selecting the instructors and approving the budget and the fliers. Unfortunately it was right after the fliers were printed that she became gravely ill. With the help of the C.O. adding notes to the fliers, and other members checking the internet information about the courses, I am receiving requests for registration materials with little delay. So far these requests have come from: Albania, China, Mexico, Canada, Ghana, Sweden, India, Japan, Saudi Arabia, and all parts of the U.S. It looks like it will be another truly international session this summer.

If you are considering attending, please contact me immediately for registration materials. The most important aspect is getting a room reserved as the deadline is April 30th. After that there is no guarantee of a room. This year you can charge both the course and housing fees, so this simplifies the arrangements.

Ellen M. EDDY, Administrator  
11736 Scott Creek Dr SW  
Olympia WA 98512  
360/754-4563  
[eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com)

## Report on the Schulze Education Fund

One of the many things bequeathed to the Esperanto community by Cathy and Bill Schulze is the Schulze Education Fund. The Fund aims to provide financial assistance to educational projects which further the use of Esperanto, primarily in North America. The interest from the capital is available for awards, for a single project or for several projects. The recipients of awards are decided by "The Catherine L. & William H. Schulze Education Fund Committee" (CWSEF Committee), a special 5-person committee of ELNA. Awards are to be made only to ELNA members, and cannot be used for salaries or scholarships. During the past year the Committee supported a proposal from Derek Roff to make up to \$2000 available on loan to instructors from foreign countries coming to teach at SFSU. They can then pay the money back after they get paid by the university.

Persons with a project for which they would like to receive some financial assistance should apply to the CWSEF Committee. The letter requesting assistance must include: (1) the plans for the project, (2) the aim of the project, (3) the duration of the project, (4) a budget for the project, (5) the names of the person(s) who will carry out the work, and (6) an indication of how many persons will benefit from the project. Applications should be submitted by April 30 to ELNA or to the Chair of the CWSEF Committee: Dr. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Av, Jennings MO 63136. Other members of the Committee are Ellen Eddy, Les Kerr, Betty Pagnani, and Liz Raible.

Ron GLOSSOP (Jennings MO)

## Hispanlingva versio de la Senpaga Pošta Lecionaro

Sekvante peton de unu el la studentoj de la senpaga lecionaro, mi enketis ĉe la Centra Oficejo de ELNA pri la havebleco de hispanlingva versio de la senpaga Esperanto-lecionaro. Ionel Oneț informis min ke ELNA ja havas tian version kaj eĉ pretas eldoni kaj proponi ĝin al dezirantoj antaŭ la fino de la jaro por uzo interne de Usono. Kio mankas estas volontuloj kiuj pretas revizi tiun version kaj poste korekti la lecionojn. Ni havas unu volontulon, Jorge Medrano en Teksaso. Se ankaŭ vi havas tian talenton kaj volas helpi, bonvolu informi min aŭ la CON.

Ellen M. EDDY  
(vidu adreson sur p. 7)

## Loko kaj regione

La ĉi-jara Zamenhofa festo organizata ĉiujanuare de SFERO (San Francisco CA), allogis kvardekon da personoj kaj kolektis \$187.00 por la SFSU-fonduso. La nova adreso de SFERO estas: PO Box 324, Berkeley CA 94701.

Danke al la laboremo de esperantistoj en New York kaj ĉirkaŭaĵo, Esperanto kaj ELNA reprezentigis ĉe la nacia kongreso de UNA-USA, okazinta de la 6a ĝis la 8a de marto ĉi-jare en New York. (*Novjorka prismo*, Marto 1999, p.2)

Se vi planas partopreni la ĉi-jaran Nord-Okcidentan Regionan Esperanto-Konferencon (NOREK) okazontan inter la 7a kaj la 9a de majo, ne hezitu kontakti Wally du Temple, 765 Braemar Av, North Saanich BC, V8L 5G5 Kanado; ☎ 250/656-1767; ☐ [esperanto@home.com](mailto:esperanto@home.com).

## Raporto pri la USEJ-Kunveno februaro, 1999

La kunveno en Filadelfio estis tre fruktdona por la planoj de Usona Esperantista Junularo. La planoj de USEJ estas:

☞ Certigi ke la retpaĝo estu ĉiam aktuala. Dum la kunveno, ni aktualigis la antikvan enhavon de la paĝo kaj ni esperas ke baldaŭ ni povos sendi la finan version al Sybil Harlow por ke ŝi metu ĝin en la retton.

☞ Instigi partoprenon en la *Pasporta Servo* en Usono, precipe per pligrandigo de la nombro da junaj gastigantoj en Usono kaj da junaj delegitoj de UEA.

☞ Certigi ke *Ktp!* estu sendata almenaŭ tri, espereble kvar, fojojn jare. La unua numero de la revivigita *Ktp!* estis tre bona, fakte perfekta, kaj ni esperas ke ĉiu estonta numero estos tiel granda kaj interesa. Kiel *Esperanto USA*, ni devos peti artikolojn de la membroj, sed ni esperas ke la membraro kontribuos.

☞ Igi ke la estrara elektado okazu kun la sekva numero de *Ktp!*. Tiam ni havos "vere" legitiman estraron. Por helpi la estrarajn elektadojn de la venontaj jaroj, ni komencis fari novan konstitucion por USEJ. Ĝi tre similas al la *ELNA By-Laws*, se oni permisas tion. Sed, ĉi tiu ne estas gravega laboro kaj nun ni simple diskutas ĝin. La estraro de USEJ havos prezidanton, vic-prezidanton, kasiiston kaj respondeculon pri alilanda komunikado. Ankaŭ la redaktoro de la revuo estos estrarano, sed tiu ne estos elektita.

Christopher R. Culver, Prezidanto (provizora)

Liz Raible, Vic-Prezidanto (provizora)

Joel Amis, Redaktoro

Harald Helfgott, respondeculo pri alilanda komunikado (provizora)

Vincent Mandrilly, aktivulo

# Esperanto: Pordego al la Mondo

En Sankta-Luiso troviĝas la fame konata Arko Pordega, simbolo de la urbo kaj de la ekspansio de Usono en la okcidentajn regionojn de Nord-Ameriko. Ĝi estas alta, brila, bela konstruaĵo, videbla de ĉiu kvartalo. Oni nomas ĝin "PORDEGO AL LA OKCIDENTO".

Sed ni esperantistoj havas pli bonan pordegon: ni havas lingvon, kiu estas "PORDEGO AL LA MONDO", ne nur al iu limigita regiono. Kaj jen la devizo de la 47-a Landa Kongreso de ELNA, kiun gastigas la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso ĉi-somere. Nia pordego estas brila kaj bela. Sed ĝi ne estas bone videbla de ĉiu "kvartalo" de niaj mondo kaj socio. Tial ni pritraktos multajn temojn pri la disvastigo de Esperanto kaj kiel diskonigi ĝin al la nuntempa mondo.

Vendredon vespere ni havos la kulturman "interkonan vesperon" por la fruaj alvenintoj. Nia hotelo havas bonan etoson, kaj tie ni bonvenigos la gastojn de Usono kaj aliaj landoj (eĉ de Ĉinio, laŭdire!). En la ĉirkaŭaĵo troviĝas multaj restoracioj kaj butikoj; vi trovos ion, kio plaĉos al vi se vi deziras promeni.

Komenciĝos la Kongreso sabaton matene per solena malfermo kaj gazetar-konferenco. Sabaton kaj dimanĉon okazos kunvenoj, klasoj, prelegoj, distraĵoj kaj aliaj agadoj. Vi elektu tiujn, kiuj estas al vi plej interesaj kaj valoraj. Krom la aferkunsidojn de ELNA, inter aliaj vi trovos prelegojn, diskutojn kaj grupojn pri:

- la Esperanta gazetaro (IonelOnet)
- kiel publikigi en Esperantujo (Sylvan Zaft)
- la graveco de Esperanto-instruado en niaj lernejoj (Ron Glossop)
- literaturo
- ludoj
- kantado
- vojaĝoj

• gramatiko kaj familiara uzado de la lingvo.

Sabaton vespere, kompreneble ni ĝuos la Kongresan Banketon.

Dimanĉon matene, tiuj kiuj deziras povos partopreni en Katolika Meso. Esperantlingvan religi-etikan servon estos Ron Glossop, kun la temo "Solena servo de nia homarismo kaj nia planedaneco". Krome, ni planas matenajn ekskursojn. Ni pensas pri la jenaj vidindajoj de la urbo: la Arko Pordega, la Nova Katedralo, la Artmuzeo, Bestĝardeno kaj Botanika Ĝardeno.

London finiĝos la Kongreso. La partoprenintoj povos ekvojaĝi hejmen je tagmezo. Sed atentu! Kial ne iom ripozi kaj amuziĝi en Sankta-Luiso dum la posttagmezo kaj vespero? De mardo ĝis jaŭdo vi povos ĉeesti Instruadan Seminarion sub la gvidado de Duncan Charters. Ĉu vi ne dezirus resti en la urbo dum tiuj tagoj? Lerni de Duncan estos aparte speciala sperto por tiuj kiuj ĉeestos.

Ni bonvenigas vin... en la PORDEGON AL LA OKCIDENTO per la PORDEGO AL LA MONDO! Renkontu nin en Sankta-Luiso.

Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso  
6137 Elizabeth Av  
Saint Louis MO 63139  
eas1@eudoramail.com

Tuj post la ĉi-jara Kongreso de ELNA (vidu informojn ankaŭ sur la lasta paĝo), okazos instru-seminario gvidata de Duncan Charters ĉe Sheraton Westport Inn (la kongresejo). Por pliaj informoj, bonvolu kontakti la organizanton: Dr. Duncan Charters, Principia College, Elsah IL 62028; ☎ 618/ 374-5252; ☐ 618/374-5465; ☐ esperanto@principia.edu.

## Letetu!

LI Yong Zhu, Longjingzhongxue Riyuzu, Longjingshi Jilinsheng, Ĉinio, 39-jara instruisto, deziras korespondi por plibonigi sian Esperanton.

Arif ABDESELAM, via Abbiati 03, IT-20148 Milano, Italio, 31-jara maroka cicerono ŝatus korespondi por plibonigi sian Esperanton.

OGU Innocent N., Nkwogwu Ngru, Box 345 Nkwogwu, Abosh Mbaise L.G.A., Imo State, Nigero, 22-jara studento pri kemio volas korespondi por plibonigi sian Esperanton. Ŝatokupoj: legado, muziko, sporto, vojaĝoj.

Zenon KALINOWSKI, ul. Piaszkowa 32, PL-18402 Łomża 4, Pollando, kolektas E-periodaĵojn, kalendaretojn, poštakatojn pri naturo kaj sportoj.

Jan SKRIBA, skr. pocz. 19, PL-44217 Rybnik-17, Pollando, 47-jara farbisto ŝatus korespondi tutmonde pri E-rilataj temoj.

Junaj turistoj kaj pedagogoj en Siberio ŝatus korespondi en Esperanto: Stacio de junaj turistoj, pr. Stroitelej 30, RU-652870 Mejdurečensk-11, Rusio.

## Inglisch iz tuf

"Trespassers will be violated." (Sign spotted in a residential area in Sacramento CA)

"I have a sour trout" [sore throat]. (Overheard in a Oakland CA hospital.)

"During the alteration the customers can be shaved in the rear." (Sign in a tailor's window in Nürenberg, Germany; the same entrance is used by both the tailor shop and a barber shop.)

## Recenze

*Ili vivis sur la tero.* Maryvonne kaj Bruno ROBINEAU. Tradukis el la franca pluraj. Nantes: Opera-eldon-ejo, 1998. 243p. 240x160. Paperbindita. Kodo: **IL1002**. Prezo: \$25.70

Ĉi tiu verko ne estas tiom vojaĝ-prelego, kiom vasttema taglibro de du entreprenemaj kaj kuraĝaj junaj gefrancoj; distilajo el 4000 paĝoj de vojaĝ-kajeroj. Per piedo, per biciklo, foje per trajno, aŭtobuso, ĉevalo, eĉ per azeno, ili ĉirkaŭvagadis la mondon. Konstatu la sinsekvon de kie ili estis; Irlando, Israelo, Bulgario, Hungario, Hindio, Japanio, Ĉinio, Malajzio, Aŭstralio, Nov-Kaledonio, Tahitio, Gvatemala, Bolivio kaj hejmen al Francio.



La du ne nur "gastis kaj turismis"; ili vizitis, enketis, rimarkis, laboris. Ili rikoltis lentojn en Hindio, melk-adis je la kvara matene en Israelo, terkultivis diversloke. Bruno estas mem farmisto de farmista familio, kaj serĉas ĉie informojn pri novaj metodoj de agrikulturo. Inter la fizikaj priskriboj de la vizititaj lokoj venas perceptoj pri la loka politika situ-

acio, la popoloj, iliaj problemoj kaj kutimoj.

La priskriboj de lokoj ofte estiĝas akraj. Ilia detala priskribo de la situacio en Malajzio povas frostigi la sangan de la leganto. Kaj ĉi tiu verko pontas ok jarojn da migrado ĉirkaŭ la planedo! Kiel notis la aŭtoroj en prologo: "Vojaĝ-


ado estas universitato sen kurso-fina diplomo: universitato alirebla al ĉiu pruvanta disponeblon kaj humilon; al ĉiu kapabla relativigi ĉion, eĉ sortobatojn." Bruno kaj Maryvonne konstateble sukcesis sian kursofinan diplomon. Nepre legu ĉi tiun libron, en kiu Esperanto ludas gravan rolon.

William R HARMON (Oakland CA)

*Usono nigre-blanke.* Ionel ONEȚ, Berkeley: Eldonejo Bero, 1998. 110p. 140x215. Ringe bindita. Kodo: **USO001**. Prezo: \$8.30

Referencaj libroj havas multajn malsamajn aspektojn; iuj tro grandaj/pezaj eĉ por kafotabloj, iuj tro kondensitaj por esti vere utilaj, iuj tro dense erudiciaj, iuj tro surfacecaj. Sed lastatempe aperis *Usono Nigre-Blanke*, vere juvela modelo de tio, kio devus esti bona referenco.

*Usono nigre-blanke*, klare presita kaj el la plej utila formato, prezentas fizikan Usonon per paĝoparo por ĉiu el la 50 ŝtatoj. Maldekstre estas mapo, kun ĉefaj vojoj kaj urboj; kaj dekstre konciza tamen informoplena faktaro pri ĉefurbo, plej granda urbo, najbaroj, areo, logantaro, aliĝaro, plej alta kaj malalta punktoj, deveno de la ŝtatnomo, neformalaj kromnomoj kaj foje eĉ pli.



La formato de la dekstra paĝo estas sama por ĉiu ŝtato; la nomo en la Angla, la mallongigo, la nomo en Esperanto, kaj la ŝtata moto kun Esperanta traduko.

Noto pri tiuj ŝtatnomoj: La kompilinto uzis senescepte la Esperantajn formojn trovitajn en CEED, kiuj mem sekvas (krom kelkaj esceptoj, kiel Oregon) tiujn en PIV. Sendube debato daŭros dum generacioj pri tiuj ŝtatnomoj: Vašintono/Vašingtono, Illinois/Illinoiso, Mičigan/Mišigan ktp. Tamen tio ne estas taŭga temo por referenclibro por ĉiutaga uzado, kaj la komplilinto Oneț ne falis en tiun kaptilon. La sola pridebatinda ero en la verko estas la malantaŭa kovrilo, sur kiu aperas aro da komparojoj pri Usono; iuj faktaj, iuj opiniaj. Ne estas klare, kial tiuj aperu en ĉi tia verko; oni povus konjekti, ke ili donas ian "spicon" al la alie iom sekva enhavo.

Entute ĉi tiu verko estas neprajo por ĉiuj, kiuj bezonas havi ĉemane esencajn geografiajn informojn pri Usono; studento, verkisto, vojaĝanto, instruisto... ĉiuj. Kaj certe ĉi tiu libro taŭgas por donacoj al esperantistoj, speciale por tiuj, kiuj gastigas eksterlandanojn, ke tiuj havu ĉemane deta-lojn kiujn ni ne scias eĉ pri nia pro-pra ŝtato. Ĉu sekvos iam simila libro pri la ĉefurboj Usonaj?

Lusi HARMON (Oakland CA)

## Leteroj

### Malsamaj vidpunktoj

S-ro De Jesús pravas (*Esperanto USA* 6/1998, p.11), laŭ mia konsidero, kiam li diras ke *Esperanto USA* estas aparte taŭga loko por la apero de la lingvo Esperanto. Certe, bazaj informoj pri Esperantaj organizoj kaj iliaj agadoj devas aperi kaj en Esperanto kaj en la angla. Sed aperigi anglalingve artikolojn kaj recenzojn nur sugestas al la "eternaj komencantoj" ke ne lerni Esperanton estas taŭga maniero subteni ĝin. (Erik FELKER, Burbank CA)

Ne, s-ro de Jesús ne pravas! (*Esperanto USA* 6/1998, p.11) ELNA bezonas membrojn, la movado por disvastigo de la lingvo Esperanto bezonas la kotizojn kaj precipe bezonas ĉiujn personojn, kiuj venas ĉe ni. Ekzistas personoj, kiuj pro iu

aŭ alia kaŭzo ne povis lerni la lingvon, sed kaptite de nia celo verkis favore pri Esperanto (lingvo kaj movado). Ekzistas multaj personoj, kiuj sincere stribis sensukcese lerni Esperanton, kaj kiuj, spite al la lerna malsukceso, restis fidelaj al niaj celoj kaj subtenis Esperanton diversmaniere. Mi konsentas kun d-ro Stevens T. Norvell, Jr., kiu en *Inter ni* (125/sept. 1996) skribis rilate al eternaj komencantoj: "... se ili restas kun ni pro lojaleco al la ideo kaj idealo... Dio benu la eternajn komencantojn, ili bezonas Esperanton kaj ni bezonas ilin". (Gigi HARABAGIU, San Francisco CA)

Radikala sugesto venas de R.O. WHITAKER (Apollo Beach FL):

"... the best solution to the communication problem is the intro-

duction of Esperanto as a universal second language in the scholastic curriculum..." (*Esperanto USA* 6/1998, p. 7). The cited solution is not the best solution. The best solution is to eliminate all native languages and convert the entire world to Esperanto. Children would learn Esperanto from their parents. When they entered school there would be no second language to learn. There would be some cost and dislocation while the first generation of people learn Esperanto. But this cost is for one generation only and is small indeed when compared with the cost for the people of the entire world to learn two languages for many millions of years to come. Which is what the cited solution recommends.

## Esperanto in the Media

Instead of joking about Europanto, Peter FREEDMAN (*The Globe and Mail*, 6 Feb, 1999) tackles the "Eurobabel" and tries to answer the question, [in the light of the recently introduced common European currency] "Should there now be a common European language?". Among the suggested solutions is "Esperanto... the international language invented in 1887 by Ludwig Zamenhof, a Jewish doctor in Warsaw."

In reply to a question about Esperanto from a reader, *The Herald* (Miami FL) published in early February, 1999, some information on Esperanto and ELNA, which generated a few dozen information requests received by ELNA CO.

No article can be written about Cathy Schulze without mentioning her involvement with our language

and movement. Not even an obituary, and the one published in *San Francisco Chronicle* on Feb 24, 1999 is no exception.

### Menciinde

La venonta numero de *Esperanto USA* estos plejparte dediĉita al edukado kaj instruado (precipe lingva). Bonvolu sendi (antaŭ la 28a de majo) al la redaktoro viajn kontribuajojn tiutemajn.

Congratulations to the Esperanto Club of Rochester, NY whose members were recently the guests on a 30 minute TV show on WOKR-13 – the ABC affiliate in Rochester. The newly formed club welcomes members and letters: Thomas ALEXANDER, 97 Elmguard St, Rochester NY 14615; ☎ 716/865-7238; □ thos@compuserve.com.

Wanna know *The Four Essential Travel Phrases* in over 200 languages (including Esperanto)? Take a look at: <http://www.h2net.net/users/horndinkle>. Another very useful phrase (only in 46 languages, though) can be found at: <http://www.esperanto-usa.org/beer.htm>.

Pro limigita nombro de lokoj por nia ekskursio en Rumanio (vidu sekva paĝo), ni sugestas al vi tuj rezervi vian lokon telefonante al Esperanto-Vojaĝservo.

Adiaŭojn al: Lewis Levin (San Diego CA) forpasinta en oktobro 1998, Ms. Harry L. Shoemaker (Fayetteville AR) forpasinta en januaro 1999, Catherine L. Schulze (Hillsborough CA) forpasinta en februaro 1999, Anne Whitaker (Portland OR) forpasinta en marto 1999.

# VOJAĜU KUN NI EN ESPERANTIO '99

**NOREK** – May 7-9. La Nord-Ocidenta Regiona Esperanto-Konferenco okazos en North Saanich, 15 mejlojn norde de Victoria, BC, Kanado ĉe bela Duns-muir Lodge. Por informoj: NOREK c/o Wally DuTemple, 765 Braemar Av, North Saanich BC V8L 5G5, Kanado; [esperanto@home.com](mailto:esperanto@home.com).

**San Francisco State University Classes** – 30th year! 5-23 July; 3-week intensive multilevel courses. Instructors: Mark Fettes (New Zealand/Canada), Atilio Orellana Rojas (Argentina/ Netherlands), Joel Brozovsky (USA/Japan), and Maria Hopkins (Poland/ Canada). Contact Ellen Eddy, 11736 Scott Creek Dr SW, Olympia WA 98512; [360/754-4563](tel:3607544563); [eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com).

## Annual Convention of ELNA

24-26 July. St. Louis, Missouri plus interkona vespero the evening of July 23. St. Louis is a charming old city, on a high bluff with the Missouri and Mississippi rivers right at its very door. The local congress committee is hard at work to provide an enjoyable convention. Application due out soon.



## Pollando – Survoje al Berlino 27-31 July

We'll take advantage of our trip to Berlin to visit Zamenhof's homeland. We'll travel by airconditioned bus from Warsaw to Białystok, birthplace of Zamenhof, and Treblinka, the memorial to over 80,000 Jews, Esperantists (including Lydia Zamenhof) and others put to death there. We'll also get to visit Chopin's birthplace, Copernicus's birthplace, and a lot of Esperantists on the way in Bydgoszcz, Toruń and Poznań before arriving in Berlin early afternoon 31 July, in time for the interkona vespero of the UK.



## 84a Universala Kongreso

31 July – 7 August. Berlin, Germany No other German city has seen such historical evolution: from 59 villages into the capitol, almost complete destruction during WW II, divided into quarters, and finally into halves, before being reunited; Berlin is now growing and rebuilding faster than any other part of Europe.


**Esperanto League for North America**  
PO Box 1129  
El Cerrito CA 94530

The Congress theme "Tutmondiĝo: ŝanco por paco?" is certainly more appropriate for discussion here than anywhere else. COME AND PARTICIPATE IN THE BIGGEST MANIFESTATION OF THE WORLDWIDE ESPERANTO MOVEMENT!

## Postkongresa Ekskurso

In the Footsteps of Brâncuși from Bucharest to Budapest  
7-16 August

We have prepared a nice surprise, which we have nicknamed the "3 B's": Bucharest, Budapest, Brâncuși, which will concentrate mostly on the southern province of Romania, Wallachia, where we will travel in the footsteps of Brâncuși, the greatest Romanian sculptor and one of the most important sculptors of this century. To miss that opportunity would mean missing a unique chance to visit the birthplace of the Cseh Method, and of Ione Oneț, who will be our guide, and the last eclipse of the sun during our lives!



## Esperanto-Vojaĝservo

6104 La Salle Av  
Oakland CA 94611  
[510/339-2001](tel:5103392001)  
[510/531-0152](tel:5105310152)  
[lusiharmon@aol.com](mailto:lusiharmon@aol.com)

Non-profit Org  
US Postage Paid  
Permit #1040  
Leesburg, FL  
34748